

Respondo al leteroj de aŭskultantoj, 1.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.01.02

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-160/Radiokasedo-160-A-997-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-leteroj-de-auskultantoj-1.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Komence de nova jaro ni profitas la okazon esprimi niajn bondezirojn al niaj aŭskultantoj kaj tutspeciale al ĉiuj, kiuj skribis dum la pasinta jaro. Kaj ni malfermas nian leterujon, kiun plenigis tre abundaj vivsignoj el multaj mondpartoj.

A.- Ĉifoje antaŭ ol respondi ni ordigis tiujn ĉi ricevitaĵojn nek laŭ la devenaj landoj, nek laŭ la pritraktitaj temoj, sed tutsimple laŭ la alfabeto ordo de familiaj nomoj. Kaj laŭ tiu ĉi ordo ni peronde respondos dum kelkaj elsendoj.

Cl.- S-ro Josep M. ALTADIL en TORTOSA, Hispanio, havas la honoron unue ricevi niajn dankojn kaj niajn salutvortojn pro siaj 4 afablaj poŝtkartaj aŭdraportoj. Interalie. li skribas:

A.- "Ŝajnas al mi, ke viaj elsendoj estas tre gravaj por ke izolitaj esperantistoj restu en la movado. Koran dankon."

Cl.- La korespondataĵoj ricevitaj atestas, ke multaj izolitaj esperantistoj estas semajnon post semajno en aŭda kontakto kun la zamenhofa lingvo dank' al la elsendoj de Svisa Radio Internacia kaj ankaŭ tute certe de aliaj stacioj. Kaj tute certe tiuj elsendoj multe kontribuas al riĉiĝo ne nur lingva, sed ankaŭ kultura. Nin reciproke riĉigas la ricevitaj korespondataĵoj, ĉar ili precizigas al ni la emojn de la aŭskultantoj. Unu el la kvar poŝtkartoj montras la valon Navarro, kiu memorigas al ni agrablan paskan vojaĝon, kiun ni faris en Hispanio antaŭ multaj jaroj. Kaj nun ni direktu niajn vortojn al s-ro Jean AMOUROUX en PERPIGNAN, Francio. Li skribis:

A.- "Kun granda intereso mi legis la bultenon pri viaj programoj, kiun vi bonvolis sendi al mi. Tutkora danko pro ĝi, kiu trovas taŭgan lokon en mia venonta propaganda ekspozicio. De tempo al tempo mi kaptas viajn esperanto-programojn, kies enhavo estas ĉiam interesa. Ankaŭ la lingvo-elparolado estas senripoĉa. Entute temas pri granda efiko pere de esperanto."

Cl.- Ni dankas pro tiuj gratulvortoj kaj ni provos daŭre meriti ilin. Siajn laŭdojn Jean Amoureux skribis sur tre verŝajne efika propaganda poŝtkarto, kiu komenciĝas angle dirante, ke kiam oni venas de Dover aŭ Yorkshire, estas nature, ke oni parolu angle, kaj ĝi daŭrigas dirante en la franca, ke en Francio, interalie ĉe radiaj kaj televidaj elsendoj, ĉe la publikaj servoj, en la flughavenoj, instruado, komerco, oni parolu kaj kantu franclingve. Sekvas frazoj en la provenca kaj bretona lingvoj dirante, ke ilin oni praktikas en Tarakono aŭ Blougastell, kaj ĝi konkludas en esperanto tiele:

A.- "Sed en tempo de telefono, radio, televido, elektroniko, telematiko, ktp..., kiam fakte ne plu ekzistas distancoj, la homoj devas kompreni unu la aliajn en la tuta mondo per lingvo neŭtrala, logika, facila, tia estas esperanto."

Cl.- Kiam ni ricevas tiajn propagandilojn, ni tre atentis ne difekti ilin per truoj aŭ agrafoj, por kompletigi la kolekton de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Pro tio ni antaŭdankas la aŭskultantojn, kiuj skribos al ni utiligante tiajn poŝtkartojn. Sed ankaŭ ni ŝatas ricevi alispecajn kartojn kaj dokumentojn. S-ro Fabian BAEZ en MEDELLIN, Kolombio, Sud-Ameriko skribas:

A.- "Mi tre ĝoje kaptis vian esperantan elsendon..."

Cl.- kaj li aldonas por ni utilajn teknikajn sciigojn: daton, horon en universala tempo, antaŭ ol daŭrigi:

A.- La aŭdebleco ne estas tre klara (estas interferoj multaj...) sed oni komprenas la ĝeneralan mesaĝon. Mi dezirus scii pri la historio, disvolviĝo, nuna stato, bezonoj, apogado ktp de via elsendlaboro. Kiel ni povas kunlabori? Ĉu vi eldonas informan broŝuron? Mi bezonas elsendan horaron. Daŭrigu vian tre gravan laboron!"

Cl.- Dum serio da elsendoj ni provos raporti pri la historio de la esperanto-elsendoj svisaj, kiuj komenciĝis jam en la jaroj dudekaj, kaj ni intervjuos nian kolegon d-ro Arthur BAUR, ke li foje raportu pri sia preskaŭ kvardekjara aktiveco. Nian radio-programon ricevas normale ĉiuj, kiuj skribas al ni, kondiĉe ke ili tre legeble kaj komplete skribu sian adreson, kiel modele faris nia sudamerika aŭskultanto Fabian BAEZ. Kvar leterojn interesajn kaj afablajn ni ricevis de s-ro Günther BECKER en BLIESKASTEL, Germanio okcidenta. Li bedaŭras, ke niaj sabataj elsendoj ne estas ripetitaj poste por la tuta mondo, kiel okazas por la ĵaŭdaj, kiuj reaŭdiĝas tutmonde la sabaton, kaj tiel estas rekapteblaj ankaŭ en Eŭropo. Li dankas tute aparte por nia recenzado de la festlibro al Waringhien. Li sendis al ni kopiojn de mesaĝoj, kiuj interalie atentigis la koreanojn, ke ekde nun ili povas aŭskulti la svisajn elsendojn. Koncerne la 16-an Korean Kongreson, kiun li ĉeestis, Günther BECKER skribas:

A.- "La lastjara 16-a Korea Kongreso de Esperanto restas por ĉiam en mia memoro kiel unu el la plej sukcesaj aranĝoj sur landa nivelo, kiujn mi iam partoprenis."

Cl.- Unu el liaj skribaĵoj ankaŭ subskribis d-ro Ivo LAPENNA okaze de Konferenco de Neŭtrala Esperanto-Movado. En Francio ni salutas nun s-ron Paul BEL en CARMAUX, kiu sendis aŭdraportojn.

El Hungario venis al ni 7 leteroj de Stefano BENCSIK en DUNAÚJVÁROS, kiuj detale raportas pri la aŭditaj elsendoj kaj petas kopion de recenzoj, kiujn ni faris pri artikoloj de s-roj Eichholz kaj Piĉ. Ni provos kontentigi lin, kiel ni provas kontentigi ĉiujn, kiuj havas tiajn petojn, se ni skribis nian prelegon. Kelkfoje ni ne antaŭredaktas ĝin, kaj tiam nur kasedokopion ni povus realigi, ĉar nenio skriba ekzistas. Tio ĉefe koncernas niajn intervjuojn aŭ babiladojn kun esperantistoj aŭ legaĵojn aŭ raportojn pri la instruado de esperanto. Ni tiam prelegas, kiel ni prelegus al publiko. Ni havas nur notojn kaj ne antaŭskribas la prelegon. Stefano BENCSIK dufoje raportas interalie pri nia recenzo de verko de ADA. Ni citu lin:

A.- "Temo de la elsendo de la 12-a de oktobro... estis prelego de samideano Claude GACOND pri Atanaz Danĉev Atanazov aŭ ADA lige kun la eldono de la libro titolita "La lingva esenco de esperanto. Konsiderinte la fakton, ke ADA estis unu el la plej atentindaj esperantologoj sur slava tereno samideano Gacond estus devinta dediĉi pli multe da spaco por la labortereno de ADA - anstataŭ la bibliografiaj datoj. - ĉiaokaze dankon por la konigo de la

libro...La 19-an de oktobro... mi aŭskultis la daŭrigon de samideano Claude GACOND pri ADA. Tiam li donis la titolaron de la eseo Lingva esenco de Esperanto. Kun intereso mi aŭskultis konigon pri "alie, aliel, alies, aliam ktp." La respondoj donitaj kaj komunikigitaj en la nomita libro estis por mi tiel interesostreĉaj kiel krim-romano."

Cl.- La venontan semajnon ni remalfermos nian leterkeston por respondi al aliaj skribintoj. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*